



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 3(70)

Junio 1970

Bonsperito ĉe Okazonta Kongreso en Portland, 1972

Oni nun bezonas gehelpantojn por la venonta usona Universala Kongreso. La plej granda bezono nuntempe estas por laboristoj en giĉetoj aŭ budoj. La nura kvalifiko estas ke oni ĝustparolas la lingvon. Aĝo: ne gravas. Pago: interkonatiĝo kaj renkontiĝo kun diversaj personoj de ĉia tuta mondo. Oni nun komencas kunigi liston de personoj, kiuj jam decidis veni al la kongreso, kaj kiuj deziras enriĉigi sian ĉeeston tielmaniere. Se vi deziras partopreni tian grandan sperton, bonvolu skribi al S-ro H.K. Ver Ploeg, E.321-19th Ave., Spokane, Wash. 99203.

Sukceso en Arizona

Ĉiu mardo, de la 7a ĝis la 10a horo vespere, havas la Esperanto-Klubo-Fenikso sian kunvenon. Ili baldaŭ komencigos klasojn en diversaj lernejoj. La unuan kunvenon partoprenis 48, anoncis la estraro.

Esperanto Inter Aviadilnovaĵoj

Monata gazeto kiu nomiĝas "Scene," anoncas en la aprila numero, 1970, por la American Airlines legantoj, ke S-ro Teddy Hagner estas instruisto de Esperanto.

Nia Daŭranta Leksikologia Devo

La ELNA-Bulteno redaktoroj, dankplenaj al ĉiuj kritikemaj legantoj, precipe al tiuj kiuj bonkore montras al ni erarojn, tamen deziras rememorigi ĉiujn uzi novajn eldonojn, kaj nepre serĉi vortojn en la suplemento. Nia laboro ne finiĝas, ekzemple, kiam ni trovas ke oni uzis en la ELNA-Bulteno, 2(70) en "La Elefanto," la vorton "specio" anstataŭ "speco." Novaj vortaroj, kaj la suplementoj de la malnovaj, donas al ni la formon "specio." Eble, ni ofttrovos inter veraj eraroj tiajn vortojn.

Por Profesiaj Fakuloj

Se vi estas specialisto kaj deziras uzi Esperanton en via fako, bonvolu rimarki ke ISAE (International Esperanto Science Association) akceptas nun aliĝojn (\$3.75 kun bulteno kaj duonmonata Scienca Revuo). Por enlistiĝi en iuj sekcioj (Astronomio, Arkitekturo-Konstruado, Filologio, Matematiko-Fiziko) skribu rekte al S-ro Ken Thomson, ISAE, P.O.Box 663, Houston, Texas 77001. Abonu ankaŭ aliajn gazetojn, ekzemple, Geologio Internacia (\$1.65), Homo kaj Kosmo (\$1.15), aŭ Medicina Internacia Revuo (\$2.25). Oni poŝtsendos al vi ekzempleron de Scienca Revuo po \$ 15.

Organizo Por Malmultigi Popolanaskreskadon

Eksistas grupo kiu nomiĝas ZPG (Zero Population Growth, Inc.), kiu estas neprofita, voluntula organizaĵo. Ĝi rekomendas ke oni tuj faru ĉion eblan por haltigi la tajdon de loĝantara kreskado: 1.) ke ĉiu familio havu nur du infanojn, 2.) ke ĉiuj rimedoj de nasklimigo, inkluzive laŭleĝan abortigon, estu libere haveblaj, kaj 3.) ke oni reviziu la impostleĝojn. La Golfeta Esperantisto (de SFERIDO, junulara filio de SFERO) en California ĉijare inkluzivis kaj artikolon pri la problemo, verkita de Denis LeCam, kaj inviton por membriĝi (adreso: ZPG, 367 State St., Los Altos, Cal. 94022).

ELNA-BULTENO

REDAKTOROJ: Donald Munro
Rodney Ring

ELNA-Bulteno
ADRESO: Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

Indianoj Lernas Esperanton

S-ino Roan Stone instruas klason ĉe Fort Wingate, New Mexico, en kiu estas anoj de la gentoj kiuj nomiĝas Omaha kaj Kiowa.

Mezgrada Eksperimenta Studgrupo

S-ro Tom Goodman, kalkulila spertulo, Baltimore Co., Maryland, dum intensiva tri semajna ĉiutaga esperanta instrukcio, ĉe Woodlawn Junior High School, donis bonan enkondukon en Esperanto al 15 studentoj. La vortaro por la kurso komenciĝis per elektitaj eroj en la kampoj de iliaj intereso.

La Walla Walla Esperanto-Societo Ĝuas Belan Vesperon

En marto membroj de la Walla Walla, Washington, Esperanto-Societo ĝuis tipan japanan gastamon ĉe la hejmo de D-ro kaj S-ino Schwenke. Laŭ la japana tradicio, la gastigantino kuiris "Sukiyaki" manĝon antaŭ la gastoj, kiuj sidis sur kusenoj ĉirkaŭ malalta tablo. Manĝbastonetoj estis uzitaj, kaj la hejmo estis ornamita per paperaj lanternoj.

Nova Klubo en Oregon

En aprilo, 1970, naskiĝis esperanta grupo en Salem, Oregon. S-ro Gilbert Peters, 1660 Winter St. S.E., Salem, fariĝis la unua prezidanto. Aliaj elektitaj inkluzivas: Joseph Gamble, vic-prezidanto; Sylvia Boaz, sekretariino; Doris Page, kasistino; kaj Beth Peters, koresponda sekretariino.

Internaciaj Vizitantoj en Usonaj Domoj

La programo kiu nomiĝas "Pasporto" celas provizi gastigantojn por mondveturantoj. Usonanoj kiuj nun deziras partopreni, precipe por la 1972 Internacia Kongreso, skribu al S-ro Gerry Peterson, 78155 W. Norwood Rd. Tualatin, Oregon 97063.

La Portland, Oregon, Esperanto-Societo Gajnas Monon por Esperanto

Membroj de la Portland Societo okazigis publikan vendon en majo, kaj gajnis \$175 por la 1972 kongresa kaso. La varoj estis artikoj donitaj de la membroj.

"World Federalist" publikigas Artikolon pri Esperanto

Artikolo de D-ro James Lieberman aperis en la maja numero de "World Federalist". Ĝi komenciĝas en Esperanto jene: "Esperanto estas utila, praktika lingvo por la sciencisto, studento, turisto, aŭ ordinara civitano -- speciale mondfederalisto." La artikolo daŭras en la angla lingvo klarigante la atingojn kaj avantaĝojn de nia lingvo

* * * * *

Viktoria Lago estas la dua laŭ grandeco de la ne-salaj lagoj de la mondo. Nur Lago Superior estas pli granda. Viktoria Lago situas 3,720 futojn super la oceana nivelo, kaj ĝi estas pli ol 200 mejlojn longa. Henry M. Stanley esploris ĝin en 1875. La lago kuŝas parte en tri afrikaj landoj: Tanzanio, Kenjo, kaj Ugando. Ŝipoj veturas inter la havenoj de ĉi tiuj landoj. La elfluejo de la lago estas ĉe "Owen Akvofaloj" en la Viktoria Nilo kie granda digo kaj hidroelektra centralo estas konstruita.

ARTIKOLOJ

LA MISTERAJ ANGLOJ

En la jaro 1767, du angloj alvenis en Calais, sed ili ne iris al "Dressin's Hotelo" kiu estis multe frekventita de siaj samlandanoj, sed ili loĝis en ne multe konata gastejo, pozedata de viro nomata Dulong. Ĉiutage la dommastro supozis ke ili forirus al Parizo, sed ili ne pretiĝis per forlasi, kaj ili ne demandis pri la vidindaĵoj de Calais. Ilia sola distro estis iame ĉasekskursi.

Post kelkaj semajnoj, la dommastro komencis scivoli pri ilia restado, kaj dum la vesperoj, li klaĉis kun sia najbaro, spiciisto, pri la afero. Iame ili decidis ke la gastoj estas spionoj, aliokaze ili estis suspektitaj esti fuĝantoj. Tamen, ili riĉe vivis kaj tiel bone pagis ke estis decidita ke ili estas stultuloj, kaj tiu konkludo estis, laŭ la opinio de s-ro Dulong, konfirmata de propono kiun ili post ne longe prezentis al li.

Ili invitis lin eniri sian ĉambron kaj diris "Dommastro, ni tre ŝatas vian manĝaĵon kaj vinon, kaj se la loĝado plaĉus al ni, ni restus kun vi longan tempon, sed bedaŭrinde, ĉiuj el viaj ĉambroj frontas la straton, kaj la vipkrakoj, kaj la bruo de la kaleŝoj multe ĝenas nin."

S-ro Dulong komencis ĉagreniĝi kaj diris ke se ili deziras pli bonajn aranĝojn, li farus sian eblon efektiviĝi ilin. "Nu, do", diris unu el ili, "Ni ŝatus fari proponon kiu estus avantaĝa al vi; estas vero ke ĝi postulas monon, sed ni pagos duonon de la elspezo, kaj nia restado dones al vi okazon repagi vin". "Nu," diris la dommastro, "Kio ĝi estas?" "Via ĝardeno estas tre kvieta, kaj se vi konstruus muron en la angulo, vi facile povus fari du ĉambrojn kaj tio komplete sufiĉus por ni. La elspezo ne estus granda ĉar la malnova muro kiu ekzistas farus du el la flankoj, kaj via domo valorus des pli multe.

Dulong estis feliĉa trovi tiel bonan rimedon por teni tiel profitdonajn gastojn. La ĉambroj estis baldaŭ konstruitaj; la angloj okupis ilin kaj verŝajne estis tre komfortaj. Ili vivis laŭ sia kutima maniero kaj la dommastro multe profitis pro tio. Sed li tute ne komprenis kial ili tiel enfermiĝas.

Tiel pasis du monatoj; tiam iun tagon, ili diris al li ke ili ĉasekskursos, kaj ĉar ili estos for dum tri tagoj, ili portos abundon de municio. La postan matenon ili foriris portante fusilojn, kaj kun sakoj plenaj de kugloj. La dommastro domis al ili esperojn por bona ĉasado. Ili diris al li ke ili lasis paperojn en la apartamento, kaj tial ili prenis la ŝlosilon.

Tri tagoj pasis, kaj kvar, kvin, ses kaj sep. S-ro Dulong unue maltrankviliĝis, poste suspektiĝis, kaj fine la okan tagon li venigis la policistojn, kaj la pordo estis rompita dum taŭgaj atestantoj rigardis. Sur la tablo la sekvontan noton estis trovita:

Estimata Dommastro, -- Vi acias sendube, ke via urbo, Calais, estis pozedata de la angloj dum ducent jaroj, kaj ke poste la Duko de Guise rekaptis ĝin, kaj ke li traktis la anglajn loĝantojn same kiel nia Edward III antaŭe traktis la francojn -- prenis iliajn pozedaĵojn kaj forpelis ilin. Antaŭ ne longe ni malkovris inter malnovaj familiaj paperoj, certajn dokumentojn de unu el niaj prapatroj, kiu pozedis domon ĉe

Calais kie la via nun staras. Per ĉi tiuj dokumentoj, ni sciigis ke kiam Calais estis rekaptita, li devis fuĝi, sed ĉar li esperis povi reveni, li enterigis konsiderindan kvanton da mono, proksimume ĉe la muro en via ĝardeno; la papero ankaŭ enhavis tiel bonan priskribon de la loko ke ni ne dubis ke ni povos trovi ĝin. Ni tuj venis al Calais, kaj post ni trovis vian domon, ni havigis loĝadon tie."

"Ni baldaŭ konvinkigis ke la trezoro estas enterigita ĉe la angulo de via ĝardeno, sed la problemo estis kiel fosi sen esti vidata. Ni trovis rimedon kaj ĝi estis la konstruado de la apartamento. Tuj kiam ĝi estis kompletigita, ni fosis la grundon kaj trovis la monon en la kesto kiun ni lasis por vi. Ni esperas por vi sukceson pri via gastejo, sed ni konsilas vin provizi pli bonan vinon kaj esti pli modera pri viaj prezpostuloj."

La kompatinda Dulong estis muta de surprizo; li rigardis sian najbaron, la spiciston, kaj tiam la malplenan keston; ili ambaŭ ŝultrotiris kaj konfesis ke la angloj ne estas tiel stultemaj kiel ili supozis.

EL LA ALDRANOJ FABLOJ

de Joseph Conroy

Multe plaĉas al mi tralegi malnovajn, nebonekonatajn verkojn, en kiu ajn lingvo ili skribiĝis. La lingvo ofte pliinteresas min ol la enhavo. Antaŭ ne longe venis al mi manuskripto en la kunja lingvo. Mi jam legis plurajn kunjajn verkojn el manuskriptoj kiujn mi heredis de mia patro, ankaŭ amanto de ĉiuj lingvoj. La kunja lingvo estas preskaŭ tiel facila kiel nia Esperanto, krom sia vortaro, kiu estas tute fremda al niaj okcidentaj lingvoj. Ĝia literaturo estas vasta, kaj la plejparto de la verkoj instruas belan saĝecon. Tiu ĉi lasta manuskripto enhavas rakontojn pri kiuj mi ofte legis en aliaj verkoj, rakontoj kiuj similas al tiuj de Esopo, escepte ke la esopaj estas multe malbonkoraj ol la kunjaj.

Tie ĉi mi donas tradukon de unu el la rakontoj, kiu nomiĝas "La Vulpo kaj la Sciuro." Oni devas kompreni ke en la originala verko, la bestoj ne estis tiuj ĉi, sed estis vere la menŭas kaj la nidhova. Tamen, saĝa instruisto, kiu ofte helpas min dum miaj kunjaj-alilingvaj tradukoj, certigis min ke la du bestaj nomoj plej bone esperantiĝas per "vulpo" kaj "sciuro". Tion ĉi mi faris, kaj jen do la rakonto:

La Vulpo Kaj la Sciuro

Estis foje sciuro, kiu loĝis en la sama loko kun vulpo bonekonita. Ĉiuj la aliaj vulpoj tre deziras invitiĝi al la vespermanĝo de tiu fama vulpo. Tagon post tago la sciuro rigardis la sinsekvecon de vespermanĝ-festoj, kaj tagon post tago li deziris ankaŭ invitiĝi. Okazis unu tagon, dum la ĉasaĵo estis malfacilege trovi, ke la vulpo lernis pri la deziro de tiu ĉi sciuro, kaj decidis planon por akiri la manĝaĵon de tiu vespero.

La sciuro tute kaj komplete ĝojigis kiam li ricevis la inviton de la vulpo, sed baldaŭ li eltrovis, malfeliĉe, ke li invitiĝis "kiel la manĝo" anstataŭ ol "por la manĝo."

Ofte tiu, kiu nove alvenas, ne komprenas la tutan regularon per kio la ludo ludiĝas.

* * * * *

En 1737 la vicpoŝtestro en Ameriko estis Benjamin Franklin, kaj en 1753 li estis poŝtestro de la Kolonioj. Sed, pro sia kontraŭ-britujaj agadoj, li estis eksigita de la reĝo en januaro 1774. Poste la Dua Kontinenta Kongreso restarigis lin kiel poŝtestro.

KAMPARA RAKONTO

Malpravas la ideo ke la urbo kaj la kamparo diferencas nur rilate al la grandeco de popolamaso. Grava malsimileco estas la klimato. Eĉ en la sama ĉirkaŭaĵo la kampara vetera situacio estas malsama ol la urba.

Unue, en la kamparo la ekstremeco elstaras, ĉar okaze plivarmiĝas kaj ankaŭ plimalvarmiĝas. Ekzemple, en kampara Pensilvanio eĉ la oficiala vetero-oficejo ne scias la amplekson de la temperaturŝanĝo pro la malfacilaĵoj en mezurado kaj registrado. Kelkfoje oni penis per dungado de ennaskuloj kaj enloĝantoj, sed fine sensukcese pro la malfunkcio de instrumentoj. Temperaturŝanĝoj difektis la termometrojn kaj malfunkciigis la ilaron tutan.

Samopinias ĉiuj aviadilpilotoj ke oni ne devas traflugi vintre pro la danĝero tie de frostigitaj nuboj, kontraŭ kiuj oni povas frapi sin; kaj iam okazis aviadil-tragedio kiam trapikiĝis aerveturilo per frostigita fulmo.

Ofte somere tielvarmiĝas ke la impostpagantoj plisuferas: ekzemple, kiam la ŝoseekomisiono devas fabrikigi novajn voj-afiŝojn por montri la vojkurbojn. Kiam varmegiĝas, la ŝefvojoj komencas fandiĝi kaj sin konformas al la konturoj de la montetoj kaj valoj. Komprenoble tio kostas.

Subtenas ankaŭ impostpagantoj la koston de novaj landmapoj, kiuj ofte necesas pro la terŝanĝoj kaŭzitaj de alttemperaturaj grundfluantoj. Mi mem memoras ke unu someron monteto glitante apudiĝis flotmaniere el la kampo de mia najbaro.

Alia iama elspezo estas la prizorgo pri vizitantoj enkaptitaj de la vetero. Aŭtomobiloj ofte sin trovas en la kamparo senradinge kiam fandiĝas la kaŭĉuko somere, aŭ ekhaltas la veturilo pro la rapida frostiganto de la motoroj. Oni certe devas savi la veturantojn kaj inviti ilin resti en la farmdomoj por la sezono.

En Pensilvanio ni komprenas la problemon kaj konstruas niajn domojn el ŝtonoj, kun ardezaĵaj tegmentoj, por ke ili ne ekbruliĝos pro la somera varmo. Tio estis avantaĝo unufoje por mi kiam estis milda vintro: la ŝtonoj tenis la varmon dum la tuta vintro. Mi ne bezonis pagi ion ajn por varmiĝi la domon dum tiu vintro.

Ĉasisto, unu varmegan aŭtonan tagon, pafis altflugantan fazanon: la birdo falis rapide tra la altvarmigita aero (kiel vaporo) kaj perdis la plumaron. Ĝi falis sur la varmegan ardeztegmenton, kaj estis tute bakita kaj preta por la manĝotablo kiam atingis ĝin la ĉasisto.

La plej mirinda trajto de la kampara vetero, tamen, estas la ŝanĝemeco. Kaj somere kaj vintre senaverte kaj subite la vetero ŝanĝiĝas. Ni do kutime kunportas pelt-paltojn dum ni laboras en la kampoj, pro timo ke la vetero malvarmiĝas. Kaj ni kunveturigas ŝarĝvagonojn dum la vintro por enmeti la ne-necesan vestaĵon se hazarde la vetero varmiĝas.

Apud lageto sidis mi unu tagon en naĝvestaĵo. Mi trinkis malvarman limonadon kaj rigardis la lageton en la sunbrilo. Subite haltis la ranoj la kvakadon. Tio kutime signifas ke la vetero estas ŝanĝota. Tiam mi vidis ke ĉiuj ranoj saltis rekte al la akvo; sed tro malfrue. La vetero ŝanĝiĝis. Ili estis meze kaptitaj kun la kruroj sin etendantaj el la frostigita glacio de la lageto. Ni surmetis paltojn kaj "tranĉis" la surfacon de la lago per herbtondilo. Ni ĉiuj ĝuis bongustegaĵon tiun vesperon: rankruroj!

Oni ankaŭ povas ŝpari monon pro la vetero-ŝanĝemeco. Aŭskultu veran mallongan rakonton: unu posttagmezon mi bruligis arbbranĉon en la farmkorte apud grenujo. Mi surpriziĝis kiam la temperaturo subeniris kaj la fajro frostiĝis. Sed mi portis grandan ruĝan frostigitan flamon en la domon kaj enmetis ĝin en la frostigujon. Nun, kiam mi bezonas fajron, mi nur devas tranĉeti pecon de la flamo frostigita el la frostigujo. Do, longtempe mi ne aĉetis alumetojn.

POR STUDANTOJ

L A P A N O

De pratempo unu el la ĉefaj nutraĵoj de la homo estas la pano. Pano konsistas el miksaĵo de faruno, akvo aŭ lakto, kaj certaj aliaj ingrediencoj. Pana faruno povas esti unu el la sekvantaj muelitaj grenoj aŭ legumoj: tritiko, sekalo, maizo, rizo, terpomoj, aŭ sojfaboj.

Estas du tipoj de pano, la fermentinta kaj la nefermentinta. La pli primitiva estas la nefermentinta (farita sen fermento, kiel gisto). Nefermentinta pano estas malmola sed krusta, kaj fermentinta pano estas mola kaj pora. Fermentinta pano estas la plej populara en la plimulto de la landoj. Ĝi estas kombinaĵo de fermento kun la aliaj ingrediencoj, faruno, sukero, salo, graso, kaj likvaĵo. La fermento kiu estas plej ofte uzata estas gisto, kiu produktas etajn veziketojn de karbona dioksido kiuj distreĉas la paston kaj malpezigas kaj porigas ĝin. Oni tiam knedas la paston kaj metas ĝin en ujojn por pli distreĉigi kaj formigi, kaj poste ĝi estas bakita. Kemiaj agantoj, ĉefe baka pulvoro, iame estas uzata anstataŭ gisto, en la procezo de fari fermentinta pano. La interagado de la karbonatoj kaj acidoj malpliigas la tempon bezonatan por distreĉi la paston.

La unua pano probable estis farita el glanoj aŭ fagofruktoj, pistitaj, kaj miksitaj kun akvo, kaj bakitaj per la suno aŭ fajro. Oni jam trovis pecojn de nefermentinta pano, farita el greno, inter la ruinoj de la Ŝvisaj Lagloĝantoj, kiuj konstruis unu el la plej fruajn civilizitajn komunumojn en Eŭropo. La egiptoj sciis fari panon antaŭ la dudeka jarcento a.K., kaj pano estis vaste manĝata en antikva Romo kaj Grekujo.

Antaŭe, oni faris panon ĉefe en la hejmo, aŭ en najbaraj bakejoj; sed de la komenco de la dudeka jarcento, pano estis pli kaj pli farita en fabrikaj bakejoj. Manlaboro estis grade anstataŭita de maŝinlaboro. La maŝinoj konsistas el: miksmasinoj, transportiloj por porti la paston tra temperatur-reguligitaj ejoj dum la distreĉa periodo, aŭtomataj fornoj, kaj malvarmigaj, tranĉaĵaj, kaj volvaj maŝinoj.

Tamen, ne ĉiuj modernaj evoluoj estis bonfaraj. Ŝanĝoj en la procezo de muelado produktis blankan farunon, sed samtempe forigis multajn el la naturaj mineraloj kaj vitaminoj en la greno. Dum la dua mondmilito la usona registraro postulis ke vitaminoj kaj mineraloj estu aldonitaj al la pano. Post la milito tia reguligo revenis la ŝtata rego.

Alia malavantaĝo de centra bakado estas ke pano ofte ne atingas la aĉetanton dum ĝi estas freŝa, kaj por konservi ĝin, malgrandaj kvantoj da venenaj substancoj devas esti aldonataj al la pano.

La persono kiu deziras manĝi la plej sanigan panon, aĉetas loke bakitan panon el plengrajna (farita el la kompleta greno) faruno, sen konservilo. Bedaŭrinde, ĝi ne estas ĉie havebla.

"La homo ne vivas sole per la pano," sed dum la jarcentoj ĝi estis unu el siaj plej gravaj nutraĵoj.